Jaro V/IX. N-o 2 (50) Novembro 1927



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

EDUKADA SERIO

ENHAVO

POR SENNACIECA EDUKADO:

Redakcia Angulo. — *E. Lanty:* Sennacieca Asocio Tutmonda pri Edukado. — *E. Spiridoviĉ:* Pacifista Internaciismo aŭ revolucia sennaciismo. — *M. Van de Moortel:* La pedagogiaj taskoj de l' Eduklaborista Internacio. — *C. Freinet:* Por Sennacieca Infan-literaturo. — Inter ni. — Edukista Sekcio de SAT. — *C. Freinet:* Edukivaj Teknikoj de Sennacieca Lernejo. — *M. Boubou:* Fakkunsido de edukistoj.

REDAKTEJO: 14, Avenue de Corbéra, Paris XII-e (Francio)
ADMINISTREJO: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

REDAKCIA KOMITATO

M. Van de Moortel
Pedagogia Sekretario de l' Eduklaborista Internacio

C. Freinet
Iniciatinto de lernejtekniko "Presarto en lernejo"

M. Starr
Organizanto de Laboristaj Kolegioj el Britio

J. Zilberfarb
Redaktisto ĉe "Vojo de Klerigo" el Ukrainio

M. Boubou
Konsilkomitatano de Ruĝinstruistaro el Francio

Ĉio rilatanta la redakton de "S. R." edukada serio estu sendata al la fakestro: K-do M. Boubou, 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret) Francio.

REDAKCIA ANGULO

40 jaroj de la vivo de esperanto rompis multajn antaŭjuĝojn de la vasta publiko rilate al artefarita lingvo internacia, perfekte pruvis la praktikan valoron de esperanto kaj faris el la esperantista movado rimarkindan fenomenon en la moderna socikultura vivo de l'tutmondo.

La nuna jaro 1927, kiu markis ĉi-etapon en la vojiro de l' esperantistaro, estas speciale grava por ni, edukistoj: ĉi-jare edukista esperantista movado festas sian dudekjaron (de 1907). Kaj aparte notenda estas la sama jaro por la *prolet*edukistaro esperantista: en aŭgusto 1927 en Lyon, ĉe la VII-a SAT-kongreso, naskiĝis ĝia ido: la *Edukista SAT-sekcio*. Dank' al la samtempa aprobo pri reorganizado de "S. R.", la nova sekcio havas la eblon posedi sian presorganon — la *Edukadan Serion de "S. R."*.

Kaj jen antaŭ ni, proletedukistoj-sennaciuloj etendiĝas nova vojo de laboro, agado, kreado.

Sed ... ĉu pravas ni, suririnte la novan vojon? Ĉu sufiĉe gravas la motivoj, kiuj nin gvidas? Kion volas ni? Kion ni celas? — Jen la demandoj, kiuj postulas klaran, precizan respondon, kaj ni provos plejeble precize doni tian respondon.

NIAJ TEZOJ

Certe, nia legantaro scias la historion de l' edukista esperantista movado: parte ĝi konsistas el la kreintoj kaj kreantoj de tiu dudekjara historio, parte ĝi konas ĝin el la rakontoj (buŝaj kaj presaj) de la aktivuloj[1]). Tial do faktojn ni ne citos, nur eltiros kelkajn konkludojn:

1. Penetrinte la edukistajn rondojn, esperanto manifestis ĉi tie pli brile ol kie ajn la novon, kiun ĝi portas kun si. Eĉ se ni lasos flanke la grandan instruan kaj edukan valoron de esperanto kiel studobjekto, restos al ni por konstati la eksterordan valoron de la lingvo kiel teknika instrumento en la tutmonda edukista vivo, instrumento, kiu perfekte servas por la faka informado, korespondado, studvojaĝoj, teoria kaj praktika kunlaboro interlanda, sindikata kaj profesia propagando, ktp.

2. Tiu ĉi granda valoro de esperanto en la ĝenerala edukista vivo tutmonda rimarkeble kreskas (precipe dum la lasta kvinjaro), kiam ni prenas la proletan sektoron de tiu vivo, al kiu ni edukistoj-sennaciuloj apartenas, ĉar

---

[1]) Al tiuj ne sufiĉe informitaj ni povas rekomendi la tre koncizan, sed sufiĉe kompletan skizon de K-do Boubou en "S. R." (n-o 10—12 el jarkolekto 1926—27).

 
 

POR SENNACIECA EDUKADO

Sennacieca Asocio Tutmonda pri edukado

de *E. LANTY.*

Nia Asocio estas ankoraŭ juna. Ĝi tamen jam havas sian historion. Kiu volos ĝin verki, tiu devos tuj ĉe la komenco noti, ke la iniciatintoj ĉiam insistis pri la eduka celo de la organizo. Sur la kovrilo de la unua libro eldonita: *Tri verkoj de Leo Tolstoj,* oni ja povas legi jenon:

"La ideala socio ne devenos tute preta el Revolucio, kiun kelkiuj prezentas al si kiel panaceon.

"Estas do nepre necese sin prepari, sin ekzercadi al la tasko de mondcivitanoj, forigante el si mem la nenaturajn naciecojn, kiujn la ŝtata, enlanda edukado metis, dum nia infanaĝo, en niajn kapojn kaj korojn.

"SAT deziras kutimigi sian anaron al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo.

"Ĝi volas zorgi pri la kreado de spiritostato, kiu harmonios kun la estonta socio — kiam la perforto nuna, la ekonomiaj, lingvaj kaj ŝtataj limoj ne plu ekzistos.

"SAT celas krei sennaciecan popolon."

Kaj por atingi tiun celon, ni difinis al la Asocio jenajn taskojn:

"Batali kontraŭ la spiritaj, moralaj fortoj, kiuj subtenas la senjustan, ĥaosan reĝimon kapitalisman.

"Ĉiamaniere faciligi al siaj membroj ĉiuspecajn interrilatojn.

"Embrie funkciigi societon kiel povos estonte funkcii la universala socio."

Ĉu tiuj tekstoj ne montras klare la edukan karakteron, kiun ni ĉiam celis doni al la SAT-movado?

La laboristaj esperantistoj ne povas difini al si kiel taskon organizi strikojn. Tio ja estas afero de sindikatoj. Ili ne povas agitadi por okazigi ribelojn aŭ elektigi deputitojn. Ekzistas por tio politikaj partioj.

Sed homoj, kiuj rompis inter si la lingvajn barojn, estas ĝenerale lernemaj kaj edukemaj. Ili sekve povas pli bone ol aliaj interesiĝi pri la edukado de siaj samklasanoj. Tial ni opiniis, ke unu el la plej gravaj taskoj, kiujn oni povas difini al nia esperantista movado, estas la klerigado kaj edukado de la laborista klaso.

— Nu, bone, sed kian edukadon? Ĉu religiecan? Ĉu naciecan? Ĉu partiecan? Ĉu klasecan? Ĉu ĝi estu konkreta, praktika aŭ abstrakta, libereca? . . .

La legantoj bone komprenos, kial mi ne respondos la suprajn demandojn. Necesus ja por tio longa artikolo, kiu povus plenigi la tutan kajeron.

Estas ĝuste la tasko de la kunlaborantaro de nia pedagogia organo pritrakti serioze kaj amplekse tiujn demandojn. Mi nur diru mian ĝojon, ke la instruistoj, edukistoj, pedagogoj SAT-anoj konsentas plenumi tiun taskon en la kadro kaj sub la kontrolo de nia Asocio.

Mi havas la firman konvinkon, ke ili agas saĝe. Necesas ja, ke la edukistoj havu kontakton kun la laboristoj — la gepatroj de siaj lernantoj. Multjara praktikado de sama profesio kelkfoje difektas la juĝkapablon[1]). Kiu limigas sian horizonton je la kampo de sia ĉiutaga okupo riskas perdi ĝustan komprenon pri la rolo mem de sia profesio. La edukistoj-SAT-anoj aŭ SAT-aniĝontaj havos certe intereson kaj eĉ profiton, resti en intima kontakto kun la larĝa viva fluo, kiu trairas pli malpli glate la laboristan esperantistan movadon.

En "S. R." estos ankaŭ bone, ke kelkfoje ne-fakuloj diru sian opinion pri pedagogio kaj edukado. En la nuna sociordo ne ĉiu povas elekti profesion laŭdezire. Tial okazas, ke ne ĉiuj instruistoj posedas inklinon eduki. La instruado estas por kelkiuj nur ia panakira rimedo. Same ekzistas homoj tre edukkapablaj, kiuj havas neinstruistan profesion. Ilia opinio sekve povas esti valora, almenaŭ aŭskultinda.

Estas memevidente, ke la pedagogia revuo de SAT povas enhavi nur tezojn, celantaj sennaciecan edukadon. Kiuj estas ankoraŭ sub la influo de ia pro-patria ideologio, tiuj ne trovu lokon ĉi tie por siaj verkaĵoj. En la epoko de Aviado kaj Radio, la edukistoj, kiuj sin sentas ligitaj al la patriotisma ideologio, ne havas ĝustan komprenon pri sia tasko. Eduki ja estas liberigi la spiritojn kaj ne kateni ilin per formortiĝantaj ideoj.

La samon mi diru pri tiuj, kiuj neas la klasbatalon, pri la memvole blindaj homoj, kiuj fermas la okulojn por ne vidi la krudajn faktojn. La klasbatalo estas ja historia fakto. Sed la batalo inter la klasoj ne ĉiam montriĝas sub sanga aspekto; ĝi sin kaŝas plej ofte sub diversaj maskoj. Tiujn maskojn forŝiros nia revuo. Kaj oni povas esperi, ke la pacemaj sed sinceraj edukistoj, kiujn timigas la vorto "klasbatalo", tial ke ili eble opinias, ke ĝi enhavas en si ian sorĉan, malbonan efikon sur la homojn, konsentos fine, ke la sole taŭga rimedo por malaperigi la batalon inter la klasoj estas ĝin partopreni por starigi justan socion sen klasoj.

La esperantista laborista movado malvolviĝos ĉefe per la alfluo de junaj elementoj. Tiuj elementoj sidas ankoraŭ nun sur la benkoj de la popollernejoj. Estas do plej evidente, ke la instruistaro povas ludi tre gravan rolon en la kreskado kaj prosperigo de SAT. La Edukista SAT-Sekcio fariĝu pli kaj pli forta kaj agkapabla; ĝi laboru en kontakto kun la ĝenerala movado por ne fariĝi ia fermita sekto sen larĝa horizonto.

La aperigo de trimonata pedagogia kajero de "S. R." estas la unua paŝo sur la vojo al tute memstara monata *Sennacieca Pedagogia Revuo.* La edukistaro povas havi la certecon, ke ĝi trovos ĉe la *Ekzekutiva Komitato* de SAT ĉian eblan helpon kaj kuraĝigon. La sola konsidero niaflanke temos nur pri ĝusta takso de la fortoj por ne fari tro aventuran entreprenon.

---

[1]) La emo prikonsideri ĉion el mallarĝe profesia vidpunkto ekzistas en ĉiuj fakoj. Pro tio mi parolas pri profesia difekto de la juĝkapablo.

Pacifista internaciismo aŭ revolucia sennaciismo

(okaze de la Konferenco "Paco per Lernejo")

de E. SPIRIDOVIĈ.

Konferenco "Paco per Lernejo", aranĝita de Internacia Edukoficejo (Ĝenevo), okazis la 16—20-an de aprilo 1927 en Praha. Kunvenis pli ol 400 personoj el 19 landoj. Krom pacifista instruistaro partoprenis diversaj pacifistaj organizoj, kaj la konferenco manifestis kortuŝan unuanimecon de ĉiaj politikaj konfesioj — de klerikaluloj ĝis socialistoj.

Evidente, por ke oni ne dubu, ke la konferenco intencas atingi "Pacon per Lernejo" restante samtempe plej lojala rilate tiujn, kiuj aranĝas "militon per ŝtato" la ĉefo de ĉeĥoslovakia respubliko estis elektita "protektanto" de la konferenco, kaj ministro de l' ekstero Beneŝ — unu el "kuiristoj" de malpaco — ties honora prezidanto. Tie-ĉi naivuloj povas demandi: — "Kie do estas la bazo por la lasta aserto de l' aŭtoro?" Ni respondu — "se ministroj de l' ekstero kaj ĝenerale registaroj de burĝaj ŝtatoj estus efektive garantaj pacon, por kio do tiaokaze necesus kunvoki similajn konferencojn?"

En sia telegramo al la protektanto la konferenco interalie diras: "Fidela al la genio de via nacio, vi alten levis en via lando la standardon de la paco". Ĉu signifas tio-ĉi, ke estas nacioj bonaj, posedantaj "genioj de la paco", kaj nacioj malbonaj, ne havantaj ĝin? Se jes, ĉu ne estus pli bona, ke la konferenco sin okupu per la laboro "malfacila" — ni ne kontestu tion — disklasigi naciojn laŭ la du ecoj kaj montri al la mondo la verajn kulpulojn de milito? Certe, ĉi okupo estus naiva, sed tute konsekvenca, sed eblas, ke la afero estas pli simpla: la konferenco *komencis* sian laboron per kutima diplomatia mensogo? la leganto juĝu mem!

Unuvorte la konferenco oni komencis kun la plej malbonaj antaŭsignoj.

Ni transiru, tamen, al la enkonduka gvidparolado de l' prezidanto de la konferenco, direktoro de la Internacia Edukoficejo, prof. Bovet (Bove).

Atentiginte pri la graveco de edukado bazita sur la observo de la infannaturo kaj ties instinktoj, inter kiuj precipe grava estas la batalema instinkto kaj tiu socia, la parolinto konttente notis, ke "tre interesajn ekzemplojn donas kelkaj ŝtataj institucioj, kiuj enkanaligas la batalan instinkton de la ŝtatanoj al utilaj organizitaj agadoj je la servo de la komuno".

Por ni tute komprenebla; ke la estiminda profesoro parolis pri la "utila" (por kiu?) "enkanaligo" farata de la "ŝtataj institucioj" je la servo de l' komuno" (legu: de la burĝa ŝtato), sed absolute nenion diris pri la rimarkinda utiligo de la du instinktoj en la granda emancipa batalo de la laborularo por la vera progreso de la homaro.

Ni sekvu plue la paroladon de s-ro Bovet (la kursivo estas nia — *E. S.*):

"*La plej alta instinkto estas la religia sento kaj la amo al la patrolando.* Ili ambaŭ venas al la fina sento, el kiu ĝermas la adoro al la gepatroj, *lojaleco al la ŝtato, respekto al estro.* Tiu-ĉi sento perfektiĝas en la konscio pri la unueco de la homaro, por kio la naciaj lingvoj eĉ ne havas ankoraŭ taŭgan vorton; nur esperanto esprimas ĝin precize per la vorto homaranismo. La ĉefa taŝko de la nuntempaj edukistoj devas esti: *eduki* tiun-ĉi

novan senton pozitivan de l' homaraneco kaj *ne la negativan senton kosmopolitisman.* Formo por la homaraneco estas jam en *Ligo de Nacioj.* Ĝi ja ne havas moŝtan estron, himnon kaj flagon, sed esperantismo kreis konkretajn simbolajn, lingvon, amon al Zamenhof, la Esperon, la verdan standardon. Profunda religia eduko kondukas al la idealo de homara unueco, se oni akcentas la komunan filecon kaj fratecon de ĉiuj homoj".

De la ĉefa rimedo de l' porpaca lukto, laŭ Bovet, estas "la religia sento" kaj "la amo al la patrolando", t. e. la samaj sentoj, pro kiuj estas farata de l' komenco de l' mondo ĉiu milito. Ekz., rusaj soldatoj de carisma epoko ĉiam militadis "pro religío, caro kaj patrio". La devizo estis skribita sur ĉiuj standardoj, pri ĝi instruis ĉiuj preĝejoj kaj lernejoj. Kaj ... la saman devizon ni aŭskultas de la ĉefo de la "pacemuloj"; li predikas "religion", *ĉiam* benintan la militon, "lojalecon al ŝtato", *ĉiam* aranĝintan la militon, "respekton al estro", *ĉiam* gvidinta la militon. Kion do novan, kian "formon" portas Bovet en sian paroladon?

1. Eduki "la senton pozitivan de l' homaraneco kaj ne la negativan senton kosmopolitisman"; "formo por la homaraneco jam estas en Ligo de Nacioj". — For kosmopolitismon, sennaciismon! Vivu la patrolando naskanta militojn, kaj Ligo de Nacioj, centrejo de ĉiuj patrolandoj, la plej nova instrumento de la grandaj imperialismoj! — Jen kion kaŝas sub si la pacifista "homaraneco".

2. Malgranda korektivo al la religia eduko: dum ĝi necesas "akcenti" "la komunan filecon kaj do fratecon de ĉiuj homoj". Do, la homaranismo enportas en religio ion novan: ĝis nun oni ne sufiĉe "akcentis". Eble la "akcentado" helpos iujn trompi...

La tuta konferenco pasis en plena konformeco kun la programa paroladо de Bovet. La plejmulto da oratoroj nur kompletigis kaj ilustris la tezojn de sia prezidanto. Estis ankaŭ kuriozaĵoj. Ekz., Du Pasquier el Saarbrücken bonege citis apostolon Paŭlon, kiu "antaŭvidas tempon, kiam ekzistos nek judoj, nek grekoj, nek barbaroj, nek skitoj, sed nur unu frataro". Môbusz el Lübeck, per citaĵo el germana konstitucio, penis pruvi, ke en Germanio la leĝaro mem dekretas "la edukadon en la spirito de interpopola repacigo". En kiuj do oficialaj dokumentoj de ĉiuj ŝtatoj ne estas skribita la vorto "paco"?

Nur reprezentanto de Internacia Labor-Oficejo ĉe Ligo de Nacioj, Maurette (Moret) tro nekuraĝe balbutis, ke "la militoj devenas ĉefe de ekonomiaj kaŭzoj, pro tio la plej bona bazo por la paco estas ordigi la ekonomian staton". Sed anstataŭ daŭrigi kaj diri, ke sekve por atingi la veran pacon, necesas lukti por organizado de aliaj ekonomiaj formoj, kontraŭ la kapitalisma sociordo, li finis per la kutima por la konferenco deklamado: "Nia agado estu gvidata de la devizo: "Se vi volas la pacon, kulturu la justecon..."

En la konferenco estis serio da paroladoj, el kiuj kelkaj, precipe la informaj estis sufiĉe interesaj. Tiaj estis ekzemple, la raportoj pri internacia korespondado de lernejoj, internacia interŝanĝo kaj internaciaj tendaroj.

La internacia korespondado estas aranĝata kiel en patrolingvo (kun traduko de iu centra oficejo), tiel ankaŭ en la lernataj de infanoj aliaj lingvoj. Sed precipe larĝan progreson lastatempe havas utiligo por ĉi celo esperanto. Gvidantoj de lernejoj en pluraj landoj (precipe en Germanio)

bonege komprenis, kion povas doni la lingvo, treege facile kaj rapide ellernata de infanoj ĝis la povo memstare skribi kaj paroli en ĝi. Jen kion diris pri internacia korespondado en esperanto la raportinto el Saksio W. Hahn (Dresden):

"En 68 urboj kaj vilaĝoj en Saksujo, esp-o estas parte devige, parte fakultative instruata". El sia praktiko s-ro Hahn povas konstati ke "la esperanta korespondado de infanoj estas la plej valora maniero por vastigi la infanan horizonton, levi ĝian klerecon kaj eduki al la konscio de tuthomara solidareco. Liaj lernantoj korespondis kun Britlando, Nederlando, Polujo, Svedujo, Ameriko kaj eĉ Aŭstralio. Dua speco de korespondado estas la letera interŝanĝo de infanoj kun alilandaj instruistoj. En Saksujo oni starigis specialan internacian lernejan servon por la instigado kaj organizado de la korespondado."

Kiel specimenon de malmoraliga edukado farata de la burĝaj hipokrituloj, mi povas noti la paroladon pri la t. n. *"Ligoj de Bonago"*. Laŭ informo de G. Delanoue (Delanu) la Ligoj "instruas la infanojn ĉiutage fari almenaŭ unu bonagon kaj ĝenerale ĉiaokaze bonintence agi". Tiel la junaj "bonaguloj" estas kutimigataj de la komplezema lernejo per et-monaj donacetoj al "la pli malgrandaj", trankviligi sian konsciencon, dum la rabado de laboruloj estas benata per la leĝo.

Interesan informon pri "internaciaj tendaroj" prezentis Traey Strong kaj Barden — ambaŭ el Ameriko. Ili rakontis pri knabaj tendaroj, aranĝitaj pasintjare en kelkaj landoj. En Finnlando kunveturis knaboj el 19 landoj, inter ili ĉinoj kaj negroj. Kompreneble ankaŭ la bonega formo de internacia komunikiĝo de infanoj estas kripligata per la burĝa putra maniero. Rigardu, ekzemple, kia "heroaĵo" estis farita en iu el la tendaroj: "precipe impresiga estis, ke blankuloj kaj nigruloj dormis en la sama ĉambro"!...

En kio do estas finrezume la esenco kaj signifo de la konferenco? Ĉu estas ĝi simple vica, unu el multaj, akto de la multparola agado de pacifistoj aŭ ĝia signifo estas pli profunda? Niaopinie estas vera la lasta supozo. Kaj jen kial:

Dum la konferenco, la burĝaro kaj ti-kiuj sekvas ĝin senkaŝe rezignas de la proksimata de ĝi ĝis nun kun plej granda insisto (kaj mensogo) *principo de eksterpolitikeco de lernejo.* La tuta konferenco pasis sub la signo de propagando de la Ligo de Nacioj — la politika instrumento de imperialistaj, t. e. kontraŭpacaj ŝtatoj. Ĉiuj "pacaj" frazoj estis dronantaj en ben-laŭdegoj al Ligo de Nacioj.

Sed ĉi tio ne sufiĉas. La predikado de internacia paco absolute ne malhelpis al la ĉefa postulo de l' burĝaro:

— "La infano — estonta civitano — devas esti edukata laŭ principo de devo sciiĝi, ke ĝi devos virece *plenumi sian devon al sia familio, siaj K-doj, sia vilaĝo aŭ urbo kaj sia lando."* (Ĉi tio kaj la pluaj citaĵoj estas el la deklaro de la konferenco.)

Tiamaniere, malgraŭ iu Ligo de Nacioj, la lernanto antaŭ ĉio estas *civitano* de *sia burĝa patrolando, kiu "plenumos sian devon"*. (Ni ja bonege scias pri kia *devo* oni ĉi tie parolas.)

En kia do direkto devas procedi la agado por "faciligi la laboron de la Ligo de Nacioj"? Evidentiĝas, ke el la limoj de sia lando ĉi agado ne eliras: por "faciligi la laboron de la Ligo de Nacioj" necesas "direkti la junularon *al metodoj de intelekta kooperado"*. La esenco de ĉi tiu "in-

telekta kooperado", laŭ unu el raportintoj, s-ro Dengler, estas en tio, ke en la sistemon de lerneja influo devas esti entiritaj ankaŭ la gepatroj de la lernantoj kaj nepre "el diversaj personoj". Ili devas "formi laŭ la diversaj personoj kaj tiel konstrui grandon el malgrando": "per unueco (evidente interklasa — *E. S.*) oni atingas pacon". Konkludante el ĉi tio, unu el rezolucioj de la konferenco postulas, ke la lernantoj konatiĝadu kun memstaraj organizoj de Ligo de Nacioj kaj "precipe kun Internacia Labor-Oficejo", tiu ĉefa centrejo por la propagando de interklasa paco.

La Lernejo, t. e. instruado kaj edukado, laŭ unuanima opinio de la konferenco, devas esti penetrata per politika prilaboro de la junularo (kaj eĉ de la gepatraro). Unu el rezolucioj postulas aliformigon de lernejo en politikan tribunon, sur kiu "ofte ekstera paroladanto faros pli da impreso al la infano, ol ordinara leciono".

La deklaro parolas (tre neklare, sed sufiĉe kompreneble) ankaŭ pri la kaŭzoj de tia decida turniĝo al politikigo de lernejo.

"Tio estas ... pli frapa nun, post la granda skuego, kiu trafis la tutan homaron, kiu rompis multajn malnovajn kutimojn (evidente, la "kutimojn" de humila subiĝado al ekspluatistaro. *E. S.*) kaj postlasis tiom da konfuzigaj elementoj (legu: klaskonscio. *E. S.*) tiel en la spiritoj, kiel en la aĵoj."

La cititaj faktoj sufiĉas por klare montri, ke burĝa lernejo senkaŝe forlasas la principon de lerneja eksterpolitikeco. En tio estas la ĉefa signifo de la konferenco.

Kaj samtempe la burĝaro serĉas novajn formojn kaj streĉas siajn fortojn por plenumi sian nunan taskon — delogi la atenton de la laborularo de la vera porpaca laboro — *la ribelo* kontraŭ kapitalismo, sufoki la naskiĝintan kaj fortiĝantan senton de revolucia sennaciismo de la Proletaro per hipokrita predikado de pacifista internaciismo kaj "homaraneco".

La neeviteblan mensogecon de ĉiuj laboroj de la konferenco bonege antaŭvidis la Internacio de Eduk-laboristoj, kiu rifuzis partopreni ĝin kaj en sia respondo deklaras, ke:

... "La paco povas esti rezulto de nenio alia ol ruinigo de kapitalismo kaj ke la ribelo — la socia kaj morala neceseco por la ekspluatata klaso — estas por ĝi ankaŭ la sola efika armilo en la lukto pro la paco."

Tial, laŭ la opinio de Eduk-Intern, la konferenco "estas kaj povas esti nenio alia, ol manifestado *aŭ de infanaĵo, aŭ de socia hipokriteco*, de kiu Proletaro kaj konscia Instruistaro laŭ sia klasa devo estu malproksima".

Kion do ni povas ĉerpi el la sperto de la "porpaca" konferenco?

1. — Al la mobilizo de la burĝaro ni devas kontraŭstarigi nian mobilizon por la plenumo de efektive paca tasko: ankoraŭ pli intensa preparado en la lernejo kaj ekster ĝi de novaj kadroj da sennaciecaj klasbatalantoj por la monda proleta revolucio, ankoraŭ pli energia propagando de revolucia sennaciismo senmaskiganta la pacifisman internaciismon.

2. — Ĉar en la vicoj de la pacifistaj internaciistoj restas ankoraŭ multaj laboruloj, precipe eduk-laboristoj, kiuj ĝis nun estas sub la influo de la burĝ-pacifista hipnoto kaj ĝis nun sincere kaj naive kredas al la "homaranecaj" belparoloj de l' ideologoj de la Ligo de Nacioj, ni revoluciaj sennaciuloj, devas ĉiuokaze tre delikate, senofende, sed konsekvence kaj klare komprenigi al tiaj vojerarantaj pacemuloj la veran kaŭzon de militoj, helpi al ili liberiĝi de siaj iluzioj kaj montri al ili la solan ĝustan

La pedagogiaj taskoj de l' Eduklaborista Internacio

La statutoj de l' Eduklaborista Internacio, alprenitaj en la Brusela Kongreso (1924), difinas ĝenerale la pedagogiajn organizo-taskojn. La deklaro de principoj antaŭanta ĉi statutojn denuncas la soci-klasan karakteron de la kapitalisma lernejo kaj proklamas, ke la plena liberigado de la lernejo okazos nur samtempe kun la tuta liberigado de la laboristaj amasoj. Tiu deklaro vokas la edukistojn al la "lukto *kontraŭ* la kaptemon de la kapitalisma ideologio en la lernejo, aparte *kontraŭ* la ŝovinisma kaj imperialisma laŭdego de milito, *kontraŭ* la klerikaligado de lernejo kaj *por* la solidareco de la laborulaj amasoj sen distingo pri raso kaj nacieco". Fine ĝi diras:

"La batalo de l' edukistoj devos ĉiam esti ligata kun la batalo por radikala transformo de l' edukado, kiu igos ĉiujn instru-instituciojn alireblaj de la laboristaj amasoj. Ĝi devas esti batalo por aplikiĝo de la plej bonaj metodoj de laŭscienca instruado kaj por senpageco de la nutrado kaj kuraca prizorgado de ĉiuj infanoj."

Iom pli poste la statutoj anoncas, kiel "taskojn de l' Eduklaborista Internacio", la jenajn:

c) Kolektante kaj publikigante materialojn pri la materia, kultura kaj jura situacio de l' edukistoj en la diversaj landoj, pri la lernejpolitiko ŝtata kaj pri movado por lernejreformo, oni klare montru, ke kapitalismo — en ĉiuj landoj, kie ĝi regas — sklavigas lernejon kaj edukistojn kaj ekspluatas ilin por sia profito.

d) Studado de la demando pri unika laika (unusistema senkonfesia) laborlernejo.

e) Per publikigo de bultenoj, organizado de Konferencoj, diskutoj, sciencekskursoj, la diverslandaj edukistoj estu ligataj unuj kun la aliaj kaj estu organizata interŝanĝo de opinioj."

Ni distingas tuje la du vizaĝojn de tiuj ĉi taskoj: negativan kaj pozitivan — aŭ: kritikan kaj konstruan. La unua celas montri al la amaso de

---

vojon al paca progreso de la homaro — la sennaciecan kontraŭkapitalisman klasbatalon.

3. — La fakto mem, ke la burĝaj ideologoj rifuzas la principon de lerneja eksterpolitikeco estas plej larĝmaniere utiligenda, ĉar ĝi tute pravigas nian malnovan klasbatalan pozicion en edukado.

Nur en ĉi tia senco ni povas nekonsenti kun Eduk-Intern, kiu en la responda letero al la konferenco deklaras, ke ĝi (Eduk-Intern) ... "ne rekomendos la rezultojn de la konferenco al atento de l' pedagogia mondo."

l' edukistoj la klasan karakteron de la burĝa lernejo, forigi la dusencaĵon pri la t. n. "neŭtraleco".

la pozitiva parto estas multe pli malfacila pro delikateco kaj ĝiaj principoj mem naskis longajn diskutojn — cetere ne ankoraŭ fermitajn — en la monata revuo de l' Eduk-Intern kaj ankaŭ en ties kongresoj.

Entute, la ideologia problemo povas resumiĝi jene: marksisma interpretado de l' edukproblemo, kondukanta al prilaborado de marksisma teorio pri edukado.

Poste venas: Prilaboro de ĝenerala platformo de pedagogia agado kaj kunordigado de l' agado de la tutmondaj revoluciemaj edukistoj.

* * *

Eduklaborista Internacio, fondita en Bordeaux (Bordó)-Francio, en 1920, estis unue la rezulto de la pacaspiroj de l' avangardaj edukistoj. Ĝia pedagogia agado estis do komence ĉefe antiŝovina: kritikado de lernejolibroj, verkado de "supernacia" historia lernolibro.

Tamen, proporcie kun la kresko de la organizo kaj plifirmiĝo de la kontakto inter la landsekcioj, aliaj problemoj ekaperas pli kaj pli insiste kaj sin montras vere kiel principecaj. Ja en 1923 komenciĝis la granda debato, pri kiu ni pli supre aludis, inter la partianoj de la "*Racia kaj Homeca Lernejo*" kaj tiuj de la "*Proleta Klas-Lernejo*". Ni nur memorigu, ke dum la Brusela Kongreso (1924) kelkaj el la plej firmaj partianoj de la "Racia kaj Homeca Lernejo" agnoskis, ke ĝi estis ebla nur en senklasa socio kaj ke, apliki ĝiajn principojn en nuna socio, estus nur doni proletklasan edukadon. Tamen en la Pariza Kongreso (1925) la antiŝtata tendenco sin montris ankoraŭ per la voĉoj de kelkaj franciaj kaj portugalaj K-doj.

La demando estis plu debatata en la landsekcioj. Ĝin fermi ni ne volas, kvankam ĝi ne plu aperas en sia estinta formo en la programo de niaj Kongresoj.

Ni preferas vidi ĝin elmontriĝi ĉirkaŭ konkretaj problemoj, kiel "Lernejo kaj Religio" — "Lernejo kaj Moralo" — "Lernejo kaj Ŝovinismo" — "Instruo de Historio", kiuj stariĝis en la Viena Kongreso (1926) kaj kiujn oni solvis per klare proletecaj rezolucioj (Vidu bultenon de Eduk-Intern — Okt. 1926).

* * *

Krom la kongresoj, kies debatoj trafas senpere nur kelke da delegitaj propagandistoj, la monata Bulteno de Edukintern (aperanta per 4 eldonoj: franca, germana, angla, hispana) estas la plej grava rimedo por propagando, polemiko kaj edukado.

De proksimume unu jaro, ĉiu numero — flanke de socialaj kaj korporaciaj aktualecaj informoj — estas dediĉita al speciala temo ofte pedagogieca.

Tiel en diversaj numeroj estis interalie jenaj ĉeftemoj, kiel "interesocentroj":

Lernejo kaj Religio — Unika Lernejo — Instruo de Historio — Centjara jubileo de Pestalozzi — Situacio kaj preparado de Juninstruistoj.

Aliaj numeroj pritraktos jenon:

Ŝovinismo — Moralo — Organizado de Junularo — Instruado en koloniaj landoj, ktp.

Tiel, starigante antaŭ la membroj de l' Edukintern konkretajn problemojn ĉiutage aperantajn en ilia vivo, ni helpas ilin formi sian opinion tute konforme al la sociaj realaĵoj.

Plie, Edukintern plenkomprenis la grandan signifon de la pedagogia revolucio efektivigita en Sovetio samtempe kun la socia revolucio kaj volisinformi aparte la okcidentajn edukistojn pri tiu vasta eksperimento. Ĝi do eldonis franclingve (germanlingvaj tradukaĵoj pretiĝas): "La Programojn de l' Instruado en RSFSR" kaj "La Fundamentajn problemojn de Labor-Lernejo" — de Pistrak.

* * *

Tamen malgraŭ ĉiuj ĉi publikaĵoj, kontribuantaj prilaboron de prieduka proleta doktrino, Edukintern ĝis nun ankoraŭ ne ekatakis metode kaj tutaĵe la demandon pri edukado. Tio okazos dum la *"Pedagogiaj Tagoj"*, kiujn ĝi organizas en *Leipzig* je *Pasko 1928* — kun jena programo:

1. Materia kaj Morala Situacio de la prolet-infano.
2. La celo de l' edukado.
3. Organizado de la lerneja sistemo.
4. Programoj kaj metodoj de l' instruado.
5. Disciplino ĉe la lernantoj.

Per ĉi 5 punktoj ni precize esprimis — ni kredas — la ĉefdemandojn, sur kiuj estas eble bazi tutan eduksistemon. For de ni la vana espero, ke nur 5-taga debato sufiĉos por elĉerpi la diskuton. Ni emas konsideri ĉi pedagogiajn tagojn, kiel deir- kaj apog-punktojn por plipostaj studadoj. Ni ankaŭ esperas, ke ili donos okazon al multaj kunlaborontoj sin montri kaj kontaktiĝi kun nia Pedagogia Sekretariejo.

* * *

Tiuj teoriecaj laboroj ne malhelpas, ke aliaj kun praktika tuja intereso daŭradas, ekzemple: "Historia Instruado", demando jam havante mem sian historion en Edukintern kaj meritas specialan artikolon en posta numero.

Jen tiaj aliaj laboroj:

Batalo kontraŭ Ŝovina instruado, denuncante plejtendencan karakteron de programoj, lernolibroj, ceremonioj, ktp.... (en tiu sfero ni kunlaboras kun Internacio de Militbatalintoj).

Moralinstruado.

Instruado en la dulingvaj landoj kaj al infanoj el lingvaj minoritatoj.

Kunedukado de geknaboj kaj priseksa edukado.

Movado de la proletaj infanoj kaj gepatroj.

Psiko-pedagogio eksperimenta, ktp....

Ni ankaŭ citu la teoriecan studadon komencitan de K-do Zilberfarb pri: "Historio de socialismaj ideoj pri edukado" (Edukologio socialista).

Fine Eduk-Intern devas fariĝi pli kaj pli la centro al kiu povos kaj devos sin turni la edukistoj el tutmondo por dokumentizi sin pri ĉio rilatanta lernejon kaj eduklaboriston. Tial speciala dokumentiza servo racie organizata nun kreiĝas ĉe la Ĝenerala Sekretariejo en Parizo.

* * *

Jen certe ambicia programo por nia ankoraŭ juna organizo nun en periodo de intensa kresko. Ĝia efektivigo dependas de la laboro de Edukintern laŭ amplekso kaj profundo, de la nombro de ties kunlaborantoj kaj de la amasoj subtenantaj ties agadon.

Tial ni finas ĉi mallongan artikolon per alvoko al la legantoj de "S. R.":

Diskonigu Eduklaboristan Internacion en viajn mediojn kaj organizon!

Abonu kaj abonigu K-dojn al niaj bultenoj!

Instigu viajn organizojn ekstudi la demandojn starigitajn de Edukintern!

Ĉeestu aŭ sendu delegitojn al nia konferenco en Leipzig!

Tiel vi ankaŭ subtenos la unuecan organizon de l' Eduklaboristoj — sola klasorganismo kuniganta ĉiutendencajn edukistojn por defendo de lernejo kaj de ties laboristoj en tutmondo.

Maurice Van de Moortel,
Pedagogia Sekretario de l' Eduklaborista Internacio.

Por Sennacieca Infan-literaturo

CÉLESTIN FREINET

Malgraŭ la senmodera multego, en ĉiuj kapitalistaj landoj, da porinfanaj legolibroj, oni povas aserti, ke ĝis nun ne ekzistas vera kaj sana porinfana literaturo. Kaj ankaŭ certe, tute nenia sennacieca porinfana literaturo.

Eraris la pedagogoj, opiniante, ke nur matura homo scias, kio necesas al infano, kaj ke tiun necesaĵon la maturulo devas enmensigi ĉe la infano per lecionoj kaj ankaŭ per legolibroj. La nuna porinfana literaturo estas nur maturula penso, pli malpli bone adaptita al la infana spirito. Ĝi neniel estas vere infana kaj la infanoj ne konsideras ĝin *sia* literaturo.

La unua kvalito de porinfana legaĵo estas la "alfariteco laŭ infana mezuro"; ĝi estu tute komprenata, pensata, vivata de infanoj mem. Okazu per lego kompleta interkomunikiĝo inter la aŭtoro kaj la legantoj. Sen tia "samsenteco", legado povas liveri nek ĝojon, nek profiton.

Sed la infanoj, laŭ la diversaj aĝoj, havas specialan mondrigardon, apartan logikecon, "siajn" apartajn ĝojojn kaj suferojn tro ofte malagnoskatajn (nerekonatajn) de la maturaĝuloj. Nur infanoj povas sin interkompreni reciproke. Tial ni turnas nian atenton ĉefe al jenaj legaĵoj:

1. *Verkoj de infanoj mem.* Apliko de "Presarto en Lernejo", kiu ebligas fiksi la rakontojn de infanoj mem, ankaŭ montris kiom la infanoj interesiĝas pri la detaloj kaj diversaĵoj de la vivo de l' aliaj infanoj.

2. *Infanrakontoj de verkistoj.* Kelkaj maloftaj maturaĝuloj havis apartan kapablon revivi sian infanaĝon kaj ĝin revivigi en verko; ili sentis intense same kiel infanoj kaj ilia lingvaĵo estas plej perfekte adaptita al la spirito de l' infanoj. Oni eltiru el la verkoj de la laboristklasaj literaturistoj la pecojn uzeblajn por la proletaria edukado de niaj gelernantoj.

3. *Rakontoj pri la vivo de la primitivaj popoloj.* Tiuj popoloj havis pensoformon, mondokoncepton, logikecon per multaj punktoj kompareblajn kun tiuj de l' infanoj. Tial tiaj rakontoj allogas aparte la infanojn.

4. *Besto-rakontoj.* Ne interkompreniĝante kun la maturaĝuloj, la infano

ŝatas la kuneston de la bestoj. Ĝi ŝatas paroli kun ili kaj ankaŭ supozi animon en ĉiuj senvivaĵoj ĝin mirigantaj.

* * *

Tial niaj Gek-doj devas klopodi por esti elserĉitaj kaj komunikitaj:

1. La aŭtentaj verketoj de infanoj: ekspluateca kaj mizera vivo, neegalforta luktado, subpremitaj emancipiĝemoj igos la junajn proletidojn senti, ke ĉie sub kapitalisma boto, infanaro samdolore suferas. La rusaj infanoj, kiuj feliĉas povi rigardi pli fideme estontecon certe konkludos ĉi kritikon jene: por liberigo de l' infanaro necesas liberigo de la Laboristaro.

2. Eltiraĵoj de plej bonaj proletaj aŭtoroj, ĉefe el Nova Rusio. Originalaj verkoj montrantaj la vivon de l' infanoj meze de kapitalisma socio kaj de Revolucio. Historio de Laboro.

3. Rakontoj, legendoj, ritoj devenantaj de la miljara luktado de prapopoloj emancipiĝantaj.

4. Bestorakontoj, evitante zorgeme moralismon kaj sentimentalismon etburĝajn. Sciencemaj imago-verkoj.

* * *

Kia estu nia gvidlinio en ĉi taskoj?

Ni ne ŝatu la verkojn en kiuj sub allogaj formoj oni plenigas, plenŝtopas per eraroj la infankranion, ĉu en reakcia senco, ĉu en revolucia.

La mizeraĵoj de la proletidaro, premanta ekspluatado de ĝi, sociaj neeviteblaĵoj bridantaj ĝin estas — ho ve — efektive veraj kaj sugestivaj. La nuna socio zorge kaŝas ĉi abomenon kaj stultigas la popolon per brilego de sia propra mensogeca literaturo. Ni lasu la infanojn esprimi sian penson, ni diru al ili la belaĵojn verkitajn de laboristaj amikoj, la ĉiamajn pensojn de laboristaj prapatroj, kiuj kvankam analfabetaj kapablis produkti verkojn, potence kriantaj venĝan veron.

Ĝis nun porinfana literaturo celis preskaŭ nur riĉigon de l' eldonistoj. Ni starigu veran literaturon por la popolidoj.

Ni observu niajn infanojn en kapitalisma socio de Malnovo — en entuziasma Renovo de revolucia Rusio; ni esprimu iliajn pensojn, ni konkretigu iliajn dezirojn.

Kaj ĉefe ni zorgu verki ne falsan literaturon. *La infana vero estas en si mem sufiĉe revoluciiga.*



INTER NI

Kelkaj K-doj en nia rondo tre serioze faklaboras. Rubrikon "*Inter Ni*" ni malfermas por reciproka interhelpo celanta servon al gravaj edukistaj kaj laboristaj organizoj. Ĝi grave helpos sindonajn K-dojn diskonigi, organizi iliajn peresperantajn entreprenojn.

Ĉiu leganto devas sin prezenti por iu el jenaj laboroj; kompetenta K-do atendas ĉies helpon. Esperanto servos al tutmonda eduklaboristaro nur se *vi*, edukistaj K-doj, volos, agos kaj fake laboros.

I. Kritikado de burĝaj lernolibroj

K-do Mark Starr verkas libron pri kulpoj de lernolibroj (ĉefe historiaj) uzataj en ordinaraj lernejoj kaj tre volas havi informojn pri ĉiu lando. Se vi ne povas helpi en la afero, eble vi konas kompetentan K-don.

1. Ĉu en lernolibroj aperas: a) naciaj antaŭjuĝoj, b) klasaj antaŭjuĝoj? (Citu paragrafojn kun klaraj detaloj pri eldonisto ktp. en ĉiu okazo.)
2. Ĉu per lernolibroj oni preparas la infanon militi kaj malami aliajn nacianojn?
3. Ĉu en lernolibroj oni juste pritraktas laborist-sindikatojn, kooperativojn, socialistan kaj aliajn proletmovadojn?
4. Ĉu la lernolibro tro laŭdas sian propran nacion?
5. Ĉu estas ŝovinistaj ceremonioj en viaj lernejoj? Kia la ĝenerala atmosfero?
6. Ĉu la instruistoj protestis kaj sekve persekutiĝis? Donu ekzemplojn.

Se vi volas kompari kun la brita, vidu "S. R." (dec. 1926).

La deveno de l' informo estos menciata. Sendu plej baldaŭ al: *Mark Starr* — 25 New Street — *London* S. W. I. *(Britio.)*

II. Poŝtkartojn por geografia instruado

Franca juninstruista grupo kolektas. Sendu plej tipajn, por eksterlanda edukisto nur interesajn kartojn pri: 1. tera geografio (ebenaĵoj montoj, monta vivo, vulkanoj, marbordoj, riveregoj, klimato, dezerto, dezertaj bestaro kaj kreskaĵaro...) — 2. fiŝkaptado, ĉasado (polusa, tropika) — 3. enlandaj kreskaĵaro, industrio, komerco — 4. homa geografio (vilaĝoj, loĝejoj, religioj, ĉefmonumentoj, kostumoj, kutimoj, moroj...). — Poŝtkartojn oni retropagos — francia kolekto estas preta (300 kartoj) je dispono de ĉiulandaj edukistoj.

Sendu al K-do *P. Varène*, inst., *Valgorge* (Ardèche) — *Francio.*

III. Kino kaj Preso en lernejo

Tiuj dezirantaj partopreni organizadon kaj utiligon de l' internacia servo por apliko de et-kino kaj presarto en lernejo (vidu artikolon en ĉi kajero) sin turnu al:

K-do *C. Freinet*, inst., *Bar-sur-Loup* (Alpes-Maritimes) — *Francio.*

IV. Tutmonda Esperanta Pedagogia Servo

TEPS funkcias jam de du jaroj, informas Eduklaboristan Internacion kaj ĉiulandan gazetaron pri pedagogia, instruista movado per monata bulteno senpage sendata al kunlaborantoj kun esperanto-rezumo de "Vojo de Klerigo". Anoncu vin kaj sendu vian artikolon al: K-do *M. Boubou, 96,* rue Saint-Marceau, *Orléans* (Loiret) — *Francio.*

V. "Vojo de Klerigo"

De 2 jaroj "V. de Kl." aperigas presitan monatan esperanto-resumon (4-6-8 p.) senpage dissendatan kun TEPS, IPR kaj de nun kun "S. R." Ĝi estas ĝis nun la plejgranda teknika uzo de esperanto por gazetaro. Amase sendu al redakcio dankleterojn, promesu kunlabori kaj efektive *kunlaboru!* Mallongajn artikolojn vi direktu al TEPS; longajn vi sendu senpere al "V. de Kl." post interkonsento kun la redakcio pri jenaj temoj prefere: profesia instruado (orientado kaj konsultado) — klerigo de maturaĝuloj — kampar-ekonomia instruado — senprizorgaj infanoj — Kino kaj Radio en lernejo — novaj metodoj (serĉadoj, eksperimentoj...).

Akceptitaj artikoloj estos pagataj po 25 dol. por 16 prespaĝoj. *Redakcio de "Vojo de Klerigo"* — Spartakovski per., 3 — *Ĥarkov* (Ukrainio).

VI. Infanliteraturo

Franca ruĝinstruistaro bezonas por sia monata eldonaĵo porinfana trafajn rakontojn kun proleta, klaskonsciiga karaktero. Sovetiaj edukistoj, ĉefe vi ĉerpu el viaj legolibroj — kopion sendu al K-do *Boubou* por *"S. R."* Alian kopion (kun se eble bildoj) sendu al: K-dino *G. Bouët, Ecole Emancipée — Saumur* (M. et L.). *Francio.*

VII. Internacio de l' Eduklaboristoj

Eduk-Intern, la sola unueca organizo de klasbatalaj edukistoj, jam utiligis esperanton kaj havas sekciojn en USSR, Fr., Brit., Belg., Hisp., Portug., Ĉinio kaj "kernojn" en Sved., Aŭst., Grek., Germanio. SAT-edukistoj, aliĝu al via landsekcio aŭ — se ne estas — senpere al la sekretariejo (citante nian gazeton): *L. Vernochet, 33, rue de la Grange-aux-Belles Paris Xe.*

Edukivaj Teknikoj de Sennacieca Lernejo

CÉLESTIN FREINET

Ni diras: "Edukivaj Teknikoj" kaj ne: "Edukaj Metodoj". Tio ĉi montras klaran orientiĝon de nia laboremo. Pri edukmetodoj ni silentos: ili necesas kaj ilia nuntempa evoluo kuraĝigas edukistaron. Sed en popolinstruado, la eduka penado estas ofte misorientita.

Kiom multe da lernolibroj kaj metodoj oni prezentis al ni! Kiel perfektaj! En ili ni certe trovas bonegajn ideojn, lertajn gvidliniojn, iajn helpilojn ĉefe por la perlibra kaj skolastika instruado. Sed ni ĉiuj klare konscias, ke antaŭ nia lernantaro, ĉio malsamiĝas: iu metodo ne plu adaptiĝas, tiu konsilo mistrafas, tiu ĉi emas premi anstataŭ liberigi la aktivecon de la lernantoj.

Kiel *praktike* adapti plej bonajn metodojn al lernantoj, medio, klasanara konsisto? Kiun materialon uzi por akiri plej bonajn rezultojn, kaj kiel ĝin uzi? Unuvorte, kiel praktike realigi en popollernejo — t. e. kun multaj kaj malriĉaj, diversaĝaj kaj diverskapablaj lernantoj, kun instruistoj konsciencaj, sed nek pedagogie geniaj, nek superhomaj — kaj en ĉiam malfacilaj materiaj kondiĉoj, kiel realigi la revon de la modernaj pedagogoj per aplikado de plej efikaj edukmetodoj?

Vasta kaj malfacila problemo ĝis nun tute forlasita kaj tamen plej grava!

* * *

La teoriuloj agnoskis jam de longe la pedagogiajn avantaĝojn de kino. Ĉu tio praktike akcelis la solvon de la problemo pri adapto de kino al popolinstruo? Sed jen aperas kinaparato teknike taŭga, malkosta kaj oportuna kaj tuj multiĝas la pri kino interesataj lernejoj kaj tuj kreiĝas la vera pedagogia praktiko de kino.

Instruadon de sciencoj kaj geografio per poŝtkartoj kaj foto-bildoj oni jam de longe agnoskis, kiel tre efikan. Sed juninstruista grupo en Francio jen forlasas teorion, kolektas zorge elektitajn malkostajn vidaĵojn kaj alvokas diverslandajn K-dojn por kompletigi bildokolektojn kaj tiel grave progresigi la liberigan perbildan instruadon.

Tian saman rezulton ni akiris per nia iniciato: "Presarto en lernejo" kaj fondo de "Interhelpa pedagogia kooperativo".

Infankajeroj, lernolibroj estas tute nesufiĉaj. Kiel estas facile akuzparoli kontraŭ uzo de lernolibroj! Sed poste ... diris la instrulaboristoj, kion vi konsilas?

Ni pruvis, ke lernejo eĉ plej malriĉa povas akiri pres-materialon sufiĉan por presi, tagon post tago, tutajn librojn. Ni nun pristudas la plej bonan adapton de presarto al la lerneja laboro.

Kaj tuj kiam en lernejo estas instalita la presilaro, lernejo fariĝas viva, lernantoj skribas kaj legas plezure, instruisto interesiĝas pri sia lernejo, nacia kaj internacia interŝanĝo de korespondaĵoj eniras novan periodon de vera efektiviĝo.

Jen disvastiĝanta tekniko kapabla konkretigi klare kaj firme la plej bonajn teoriojn de noveduko. Pri la eksperimento mem, ni ne parolas en tiu ĉi artikolo. Niaj K-doj jam legis en "S. R." (Marto 1927) raporton pri tiu demando.

"Presarto en Lernejo" nur nun ekdisvastiĝas, sed ni ekvidas grandan disvastigeblon. Plej grava por ni, esperantistaj sennaciuloj, estas jena atingeblo: "Presarto en Lernejo", konservante sian internacian karakteron, atingos entuziasman sennaciismon en lernejo. Jam komenciĝis interlerneja interŝanĝo inter Svisio, Belgio, Francio kaj Hispanio. Jam stariĝas neeviteble la problemo de l' interŝanga lingvo internacia. Interŝanĝo de mempresitaj tagopaĝoj el la lernejviva libro verkata de lernantoj mem povas okazi per esperanto inter kelklandaj lernejoj. Ni asertas, ke nia eksperimento tre progresigos la ideon pri neceseco de l' internacilingvo jam en lernejo.

Ni iniciatis en Francio grupigi la geinstruistojn, kiuj uzas la etan kin-aparaton "Pathé-Baby" ("Pathé" por buboj) por jenaj celoj:

a) sin forŝovi de l' ekspluatado de la filmluigistoj;
b) helpi la kamaradojn en aĉeto de kinaparatoj;
c) prepari kaj faciligi la praktikan uzon de kino en instruado;

d) eldoni specialajn filmojn kaj per tio devigi la filmeldonajn firmojn produkti filmojn pli kaj pli bone adaptitajn al niaj bezonoj.

La kinfotaparato kaj la kinaparato "Pathé-Baby" estas praktike preskaŭ perfektaj — malgraŭ kelkaj maltaŭgaĵoj, tiu kinaparato prezentas tre multajn pedagogiajn kvalitojn.

Ni starigis kooperativon, jam posedanta kolekton da 500 filmoj, kapitalon da 3 500 frankoj kaj 40 membrojn, siajn aĉet- kaj pedagogi-servojn.

En aliaj landoj estas uzataj similaj aparatoj "Pathé-Baby". Nia filmkolekto devas fariĝi internacia. Per ĝi disvastiĝu ankaŭ sennacieca edukado. Poste ni vastigos nian agadkampon kaj prizorgos ĉiutipajn filmojn. Ni projektas nun eldoni kelkajn filmojn kun *esperanta teksto*. Tiu entrepreno povus disvastigi plej efike en lernejoj esperanton kaj internacian unuiĝemon.

Multaj aliaj iniciatoj naskiĝos per interhelpo de ĉiulandaj eduklaboristoj por apliko de edukivaj teknikoj. Kontraŭ ni staros en ĉiuj landoj la diversaj komercistoj, kiuj ekspluatas la nedecidemon kaj malforton de la instruistoj, la ĉiuspecaj solenaj aŭtoritatuloj, kiuj volus daŭrigi ĝis eterne sian rolon de malklerigistoj (obskurantistoj). Sed ni estas certegaj, ke kun ni estos la amaso de la geinstruistoj, konsciantaj pri sia devo popolklerigistoj, ĉiam serĉantaj la neprofitemajn gvidantojn, kiuj helpos ilin efektivigi parton de sia revo.

FAKKUNSIDO DE EDUKISTOJ

Ĝin malfermis kaj prezidis K-do Boubou el Orléans. Ĉeestis dudeko da geinstruistoj.

1. *Edukista SAT-sekcio.* Oni decidis kunigi la SAT-anojn edukistajn en faka sekcio en celo ligiĝi pli sisteme al klasbatalaj organizoj edukistaj kaj pli grandskale servi al ili. Kiel membroj de Gvida Komitato de tiu ĉi sekcio estis proponitaj: K-doj Van Aelst (Belgio), Stay (Britio), Laquet (Francio), Klys (Sovetio), Sarafov (Bulgario), Bonte (Germanio), K-dino Osmond (Britio), Klaĝin (Usono), Sinpak (Ĉinio), kaj japana K-do (japanaj SAT-anoj proponu iun.). Aliĝojn oni sendu al K-do Boubou, 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio.

2. *Sennacieca Revuo eduka serio.* La Gvida Komitato de l' Edukista SAT-sekcio funkcios ankaŭ kiel gvidas komitato de la eduka serio de "S. R.". Estas elektitaj kiel redaktoroj de l' eduka serio K-doj: Mark Starr (Britio), Zilberfarb (Sovetio), Boubou (Francio), K-do Célestin Freinet (Francio) kompetenta pedagogo pri l' eduka tekniko, konata pro siaj verkoj kaj laboroj en Eduk-Intern — kaj K-do Maurice Van de Moortel, pedagogia sekretario de l' Internacio de l' Eduklaboristoj. Rubrikaran programon de K-do Zilberfarb oni akceptas. Tiel, la "S. R." eduka serio estos nur klasbatala kaj neniel konkurencos Internacian Pedagogian Revuon; ĝi estos redaktata laŭ populara formo, enhavos rubrikojn por ne fakedukistaj proletoj, por gepatroj, por junuloj kaj estos facile legebla fruktodone de ĉiuj SAT-anoj. La gazeteto enhavos modelan porinfanan klaskonscian rakonton kaj specialan paĝon pri Instrulaborista Internacio sub kontrolo de K-do Maurice Van de Moortel.

3. *Interŝanĝa Oficejo* estas kreata. Jam de longe SAT-edukistoj peradas interŝanĝon de edukistoj kaj lernantoj (studentoj) el diversaj landoj kaj

ankaŭ de pedagogia materialo (geografiaj poŝtkartoj, sciencinstruaj objektoj, lekciaj tekstoj). SAT-anoj uzu mem kaj diskonigu nian servon por profitigi ne-esperantistajn K-dojn. Petoj por interŝanĝo de personoj dum libertempo okazu ĉiujare antaŭ majo, oni sin ternu al K-do Boubou; pri interŝanĝo de materialo sin turni al K-do Varène, Valgorge, Ardèche (Francio). Tiu servo kunlaboros kun la Tutmonda Lerneja Servo Esperantista.

4. *Rilatoj kun TAGE kaj IPR* estis serioze pritraktitaj. Kvankam ne starante sur klasbatalo, TAGE (Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj) pro sia bazo rigore pacema kaj progresema estas konsiderita kiel varbejo por SAT. Oni rekomendas daŭrigi la interŝanĝon de anoncoj en Sennaciulo kaj Internacia Pedagogia Revuo (organo de TAGE), rekomendas al SAT-instruistoj aboni IPR (faka teknika revuo simila al "Interligilo de PTT), supozante ke IPR rekomendos abonon al Sennacieca Revuo (ĉiuj serioj). Oni konstatis, ke nuntempe estas tute ne eble aboni iun serion fakan de "S. R." aparte.

5. La SAT-edukistoj estas insiste petataj kunlabori per sendo de dokumentoj kaj artikoloj al:

a) Tutmonda Esperantista Pedagogia Servo (TEPS), kiu de du jaroj per sia monata informilo senpage sendata al ĉiu kunlaboranto dokumentizas la avangardajn edukistajn gazetojn (adreso de K-do Boubou);

b) al: Redakcio de "Vojo de Klerigo", kiu eldonas ĉiumonate esperantolingvan resumon tre valoran, kiun petu ĉiu SAT-edukisto ne ĝin ricevanta (adreso: Spartakovski per., 3, Ĥarkov (Ukrainio);

c) al: Oficejo por Informado kaj Kulturrilatoj kun Eksterlando de Ŝtata Eldonejo Ukrainia (sama adreso en Ĥarkov), kiu alvokas la SAT-anaron por bibliografia kunlaboro. (Vidu alvokon en Sennaciulo.)

Oni decidis reorganizi tradukservon pri resumo de "V. de Kl." kaj perletere danki tiun redakcion tial, ke ĝi uzis esperanton, kiel teknikilon por siaj internaciaj rilatoj.

EDUKISTA SEKCIO DE SAT

Estas en SAT nuntempe 500 edukistoj, t. e. ĉirkaŭe 1/10 de la tuta SAT-anaro. Ĉiu edukista SAT-ano havas la devon: unue sin anonci al SAT, kiel edukisto — due sin anonci al SAT-edukista sekcio, kiel aliĝanto kaj kunlaboranto. Memoru tion, sendante nun vian SAT-kotizon al Leipzig. Jarlibro 1928 montru vin, kiel edukiston kaj anon de SAT-edukista sekcio. (Neniu aparta kotizo postulata krom abono al "S. R.").

Nia Gvida Komitato nun formiĝas, laŭ proponoj de nia fonda fakkunsido dum Lyon-a kongreso. Definitivan liston donos venonta eduka numero de "S. R.".

Proletaj edukistoj, ĝis nun starintaj ekster SAT, SAT-aniĝu! SAT-edukistoj, aliĝu la SAT-sekcion, vivigu ĝin, ne nur promesu, sed efektive helpu niajn servojn, verku por la eduka serio de "S. R.".

Sendu aliĝon kaj materialon al fakestro: K-do M. Boubou, 96 rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret) — Francio. —

a) dum burĝa edukado estas bazata sur naciaj interesoj, edukada kreado de proletaro aperas sur bazo kaj estas akcelata de interesoj internaciaj kaj eĉ super- kaj ekster-naciaj;

b) dum en konstruado (ni parolas pri *krea* konstrulaboro) de burĝa pedagogio aktive partoprenas nur tre nemultenombraj grupetoj da privilegihavaj elitoj-poliglotoj por kiuj internacilingvo estas ne tro bezonata, — proletedukado estas kaj estos kreaĵo de *amasoj*, amasoj da klasbatalemaj edukistoj kaj klaskonsciaj laboristoj kaj al ĉi-amasoj nur facila lingvo internacia povos doni kaj donas la ŝlosilon al la pordego, kiu malfermas la vojon al mondskala kunlaborado.

3. La konstanta konflikto de rivalaj klas-ideologioj en la edukista sektoro de l' esperantista movado, samkiel tiu en la tuta esperantista movado, estas logika kaj neevitebla sekvo de tiu movado, ĉar ĝi estas movado socia. Du direktojn havas la batalo: a) batalo por la instrumento de kultura "produktado", kia estas esperanto; b) batalo por certa parto el la edukistaj amasoj (ĉar la esperantista edukista movado vastiĝas kaj havas tendencon farigi amas-movado).

4. La rolo de l' proleta alo en la edukista esperantista movado konsistas do: a) en la realigo de la signaldiro "*Esperanto — je la servo al proletedukado kaj al proletedukista movado*"; b) en la utiligo de esperanto por proletece influi la amasojn da etburĝe pacifistaj esperantistaj edukistoj kun la celo klasideologie reeduki ilin. Ĉar nia proletedukista tendenco konsistas plej parte el elementoj multe pli aktivaj kaj pli kreivaj ol la "neŭtrala" movado kaj ĉar la idearo mem, kies portantoj ni estas, akcelas la progreson kaj enrigardas la estontecon, dum la pozicio de l' "neŭtraluloj" tiras returnen aŭ — en la plej bona kazo — igas paŝeti sur la sama loko, — ni sentime povas aserti, ke la povebloj de la proletedukista tendenco estas senmezure pli grandaj kaj la venko, kiun ili promesas, estas ne evitebla.

5. La taktiko de l' proleteca sennaciula edukistaro estas diktata de la specifaĵoj de l' medioj en kiuj ĝi agas. Ĝi havas kiel ĉefajn taskojn:

a) organize kaj labore unuigi la proletece-pensantajn edukistojn esperantistajn el la tuta terglobo;

b) labori en idea, agada kaj organiza kontakto kun la tutmonda revolucíedukista movado konsolidiĝanta en la *Eduk-laborista Internacio (Paris)* kaj la tutmonda movado de l' proletesperantistaro organizita en la *Sennacieca Asocio Tutmonda.* (SAT);

c) konservi kaj disvolvi fakkunlaboradon teknikan kun la "neŭtra" *Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)* por starigi pli larĝan fakinformadon kaj dokumentizadon mondskalan kaj konkeradi la amasojn sur grundo de praktika faklaboro.

Jen kiel ni bazas la pozicion de nia juna movado, jen kiel ni konceptas niajn taskojn. Kaj la rimedoj? La plej grava estas sendube nia revuo. Tial do ni diru kelkajn vortojn pri ĝi.

NIA REVUO

Ĝi estos serioza stud-, instru- kaj labor-organo, sed samtempe populara laŭ sia lingvaĵo kaj stilo, por ke ĝin povu legi ne nur fakuloj, sed ĉiuj K-doj, kiujn interesas sorto de l' infanaro kaj junularo kaj edukadoproblemoj. Ĝia programo ampleksos jenajn rubrikojn:

1. *Problemoj de prolet-edukado:* artikoloj ĝeneralaj kaj specialaj pri tiuj fundamentaj problemoj.

2. *Kontraŭ la burĝa edukado:* senmaskigo de ŝovinismo, militarismo, klerikalismo en edukado.
3. *Socialismo kaj edukado:* elektitaj paĝoj pri edukado el verkoj de socialismaj pensuloj kaj el socialismaj dokumentoj.
4. *Edukada praktiko:* pri novaj edukmetodoj kaj eksperimentoj.
5. *Edukado en laborista familio:* pritrakto de apartaj problemoj, sugestoj al gepatroj, diskutejo de needukistaj legantoj, ktp. ...
6. *El la vivo de l' infanaro kaj junularo:* elementoj de pedologio, morala kaj materiala situo de l' proleta infano, infanorganizoj, ktp. ...
7. *El la vivo de l' lernejo kaj edukistaro:* morala kaj materiala situo de l' lernejo kaj edukistaro, por-lerneja batalo, edukista movado, ktp. ...
8. *Paĝo de l' Eduklaborista Internacio:* novaĵoj, informoj, enketoj.
9. *Infanliteraturo:* modela rakonto por prolet-infanoj.
10. *Bibliografio:* recenzoj, notoj, konsiloj.
11. *Nia laborangulo:* enketoj, diskutoj, demandoj-respondoj, anoncetoj, SAT-sekcio edukista, nia interhelpo...

Plie, ni volas, ke ĉiu kajero de l' edukada serio pritraktu specialan temon. La unua prezentata kajero havas sian specifan vizaĝon — *sennaciecan. "Sennacieco kaj Edukado"* — ne hazarde ni elektis ĉi-temon kiel interesocentron por la unua kajero de nia presorgano. La vizaĝo de tiu-ĉi kajero reflektas, — pli malpli precize, ni kuraĝas kredi, — la multtrajteunuecan vizaĝon de nia kolektivo, de l' klaskonscia sennacieca proletedukistaro.

Tiu ĉi kajero, la unua, certe malproksima de perfekto, modesta kaj samtempe kuraĝa — kaj eble aroga — provo de memstara elpaŝo de sennacieca proletedukistaro sur tutmonda laborkampo, tiu ĉi malgranda foliaro estu vekilo, instigilo kaj fermentilo. Ĝi laŭtigu nian signalon: SAT-edukistoj, amase ni eklaboru! *La Redakta Komitato.*

La unua provo de sennacieca arto

estas la serio de poŝtkartoj ĵus eldonitaj. — Unu serio konsistas el kvin kartoj kaj kostas 0,50 mk. germ. Mendu tuj ĉe la ADMINISTREJO DE SAT, R. LERCHNER COLMSTRASSE 1, LEIPZIG O 27

La plej bona propagandilo por SAT

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)